

# Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista

Aperas ĉiumonate



Redaktoro :  
Juil Karnas  
Van Haverlei, 14  
Deurne-Zuid (Antw.)

Administranto :  
Gerard Debrouwere  
Magdalenastr. 29  
Kortrijk



**Jara abonprezo** : 20 frankoj. — Eksterlando : 5 belgoj ;  
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.  
**Poŝtĉeko** : 2321.50 de Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk.

## La tago de l'Malvivuloj.

EL LA ITALA « CUORE » DE EDMONDO DE AMICIS. (1)

la 2-an de novembro

Tiu ĉiu tago estas dediĉata al la rememoro de la mortintoj.

Ĉu vi scias, Enriko, al kiuj mortintoj vi, knaboj, ĉiuj devas pensi la hodiaŭan tagon ? Al tiuj, kiuj mortis por vi, por la knaboj, por la malgrandaj infanoj. Kiom mortis kaj kiom ankoraŭ ĉiam mortas ! Ĉu iam vi pripensis kiom da patroj vendis sian vivon por la laboro, kiom da patrinoj malsupreniras tro frue en la tombo, konsumitaj pro la mankoj, kiujn ili altrudis al si por siaj infanoj ? Ĉu vi scias kiom da viroj prenas al si la vivon instigataj de malespero kiam ili devis vidi siajn infanojn en mizero, kaj kiom da virinoj sin dronigas aŭ mortas pro ĉagreno, aŭ frenezigaĝo, ĉar ili perdis infanon ? Pensu hodiaŭ pri ĉiuj tiuj mortintoj, Enriko. Pensu pri la instruistinoj, kiuj june mortis post kiam ili pro laciĝo konsumiĝis kaj kiuj tiom amis siajn gelernantojn, ke ili ne ĝustatempe kapablis forlasi ilin ; pensu pri la kuracistoj, kiuj mortis pro infektaj malsanoj, kiujn ili kuraĝe kontraŭstaris, por resanigi infanojn ; pensu pri ĉiuj tiuj, kiuj dum ŝiprompiĝo, dum brulado, dum tempo de malsato, dum momento de plej granda danĝero, al infano cedis la lastan, savigan pecon da ligno, donis la lastan parton de ŝnuro, donacis la nuran buŝprenon da pano, por poste morti feliĉe pro la ideo ke ilia sindonemo savis la vivon al eta, senkulpa estaĵo. Tiaj mortintoj estas

(1) « Cuore » (Koro). — Estas kvazaŭ taglibro per kiu la aŭtoro gvidas nin en urba lernejo de Torino (It.) kaj skizas la vivon en lernejo, strato kaj hejmo, pere de apartaj historietoj, kiuj plejparte estas memstaraj. Ili predikas amon por la patrujo, por la samlandanoj, por la homo ĝenerale ; ili montras la grandajn, diversajn devojn de ĉiu horosta knabo. « Cuore » ne nur estas ĝuebla de geknaboj sed ankaŭ de grandaj personoj pro la subtila analizo de ĉiu homa ĝojo, de ĉiu homa sufero. (N. d. l. Trad.)



nenombreblaj, Enriko ; en ĉiu mortintejo ripozas centoj da tiuj sanktaj kreitaĵoj, kiuj, se ili dum momento estus revokataj al la vivo, povus citi la nomon de infano por kiu ili foroferis la plezurojn de sia juneco, la pacon de sia maljunaĝo, sian amon, sian penskapablon, sian vivon : junaj patrinoj du-dekjaraj, viroj en la plenforteco de sia vivo, kriplaj ok-dekjaruloj, junuloj, — ĉiuj heroaj kaj nekonataj martiroj de la infanoj — kaj ĉiuj tiel noblaj kaj bonaj, ke la tero ne produktas sufiĉajn florojn, por meti sur iliajn tombojn. Tiel oni amas vin, infanoj !

Pensu hodiaŭ pri tiuj mortintoj kun dankemo kaj vi estos pli obeemaj kaj pli afablaj al ĉiuj kiuj amas vin kaj kiuj zorgas pri vi, kara infano, kiu feliĉe nenium devas ankoraŭ priplori la nunan rememortagon.

Trad. Juul Karnas.

## Skoltismo.

Al Vi, skoltaj Fratoj,  
Al vi, kiuj interesas pri Skoltismo !

Ĉiu skolto konas sian nacian skoltan devizon : « Estu preta » — « Wees vaardig. » En Anglujo oni diras « Be prepared ». La franca skolto nacilingve diros : « Soyez prêt ». La hispana preferas : « Sea preparado », En Finnlando la devizo estas : « Ole valmis » ; en Flandrujo : « Wees vaardig » ; en Nederlando : « Wees bereid ». Germana skolto ĉiam ekkrias : « Sei fertig » ; la rusa « Pregatv » ; la norvega « Vaer beredd » ; la serba : « Budi spremna » ; la sveda : « Var redo » ; la estona « Bud pripraven » ; la greka : « Na isso etmios » ; la latva : « Esi nudra » ; la itala : « Prepari » (sii preparata) ; la pola « Czuwaj » ; la ĉina : Yu be ».

Malfeliĉa homo ! ĉu mi kiel skolto devas koni dek-sep formojn de nur du malgrandetaj vortoj ? Ĉu mi devas tordi mian langon kaj ellerni cent vortojn por ke mi povu diri du ?

— Tute ne ! — ekkrios la anglaj skoltoj, — ĉiu povas lerni nian devizon kaj ĉiu povas diri : « Be prepared ».

— Ho ne ! — respondos la germanoj, — diru prefere : « Sei fertig » ; tio sonas bele kaj fortege !

— Neniam ! — diras la francoj ; — soyez prêt » tio estu la skolta devizo ! Tiel devas diri ĉiu nacio !

Skoltoj, estas nio devo ellerni internacian, neŭtralan devizon : « Estu preta ». Skribu « Estu preta » en grandaj literoj sur viaj leteroj, kaj sur viaj lernejoj taskoj. Estas ne nur bona propagando por nia skolta devizo, por la varbado de Esperantistoj al skoltismo kaj de skoltoj al la Esperantomovado, estas ankaŭ via frata devo kiel skolto ! De nun ĉiu skoltfrato en Flandrujo uzu nian devizon : « Estu preta » !

La fluganta Blupiedo  
Subtrupestro V-a. Bruĝo.

## Unua Alvoko!

Komunikoj de la Brusela kongreskomitato.

La ĉiujaraj kongresoj de F. L. estas brilaj punktoj en la analoj de la Flandra Esperanto-movado. Kvazaŭ mejloŝtonoj ili staras sur nia vojo, ĉe kiuj dum momento ni haltis, por ĵeti returnan rigardon sur la efektivigitan laboron, por poste, kun nova ardo, daŭrigi niajn klopodojn kaj verdigi pli vaste Flandrujon



La kongresoj plej bone respegulas la staton de la movado en Flandrujo ; ili estas la fidindaj mezuriloj de nia esperantista vivo. La pioniroj el la Flandra Esperantistaro kiuj ĉeestis la starigon de Flandra Ligo dum nia unua en Antwerpen kaj kiuj ĉeestis en Aalst, Kortrijk, Mechelen kaj Costende plej bone povas laŭvalore taksi la iritan vojon.

Ĉiujare pli multnombre ĉeestataj kaj pli interesaj laŭ enhavo tiuj grandaj jarkunvenoj de la Flandraj Esperantistoj permesas al ni havi esperplenajn antaŭvidojn por la estonto. Tial nia Sesa en Brussel estos, laŭ la jam konstateblaj antaŭsignoj, inda unuo en la vico de la Flandraj Esperanto-kongresoj.

La Organiza Komitato, kunmetita antaŭ du monatoj, ne fordormis sian tempon, sed, pretigante la terenon, ĝi nun eliras kun la praktika laboro. Belaj trikoloraj propagandmarkoj jam estas eldonitaj kaj kostas po 7.— fr. por cent. (Mendojn ni nur plenumas je antaŭpago) Ni jam sendis al ĉiu aliĝinta grupo de F. L. certan kvanton da ili ; ni esperas ke oni ĉie entuziasme akceptos tiujn belajn propagandilojn kaj ni plenfide atendas pliajn mendojn.

La kongreskotizo estas fiksita je 12.— fr. ; (por eksterlandanoj : 2 1/2 Belgoj). Ni antaŭvidas la eblecon rekompenci la frualigojn (ĝis Pasko). La poŝtĉeka konto, sub n-o 4136.04, funkcias je nemo de E. Cortvriendt sek. de la Organiza Komitato. La adreso de la kongresa oficejo estas : 3, P. van Humbeekstr. Brussel-West.

Por fini ĉi-tiun unuan komunikon ni atentigas al tio, ke plena sukcesigo de kongreso ne nur dependas de la O. K. Ĉiu unuopulo, ĉiu loka grupo povas efike helpi. Tial ni insiste petas, — ĉi-tie ni direktas nin speciale al la fidelaj s-anoj el niaj rangoj, — ke ili pagu jam nun la kongreskotizon, ili faros al ni grandan servon.

Al la grupoj ni direktas la peton ke ili, se tio ne jam estas farita, senprokraste starigu ŝparkasojn por faciligi la partoprenon al siaj anoj.

Ni certigas agrablajn kaj interesajn kongrestagojn al ĉiu partoprenanto, krom tio, ni zorgos por malmultekostaj kongresaranĝoj por ke neniu estu malhelpata kaŭze de financaj kialoj.

Kaj nun al laboro ; ĉiu helpu laŭ sia povo !

La L. K. K.



# La Maristoj kaj Esperanto.

Ĉu troviĝas iu, kiu povas havi pli grandan utilon de Esperanto ol maristo? Multaj maristoj, kiuj scias kelkajn frazojn de la angla, germana, franca, hispana aŭ iu alia lingvo, opinias, ke pluaj lingvaj studoj estas superflujaj. « Mi parolas sufiĉe por helpi al mi en fremda lando » estas esprimo, kiun oni ofte, tro ofte aŭdas, kvankam nenio povas esti pli malvera. La vortprovizo, kiun ili havas, estas tre limigita kaj la frazarango estas pli ol komika.

Per vigla fantazio oni povas kompreni la lingvaĉon, sed tio ne sufiĉas. Je iu okazo interŝanĝi kelkajn frazojn, mendi trinkaĵon, aĉeti vestaĵojn en vestvendejo aŭ paron da ŝuoj ĉe ŝuisto, tion oni povas fari per gesta esprimado. Scii lingvon signifas: libere povi ĝin uzi en ĉio kaj pri ĉio, ĉu temas pri diskutado de la tagaj demandoj aŭ ĉu oni kiel vojaĝanto devas fari movi inter la loĝantoj de diversaj landoj.

La angla, franca, germana, k.a. lingvoj estas tro malfacilaj por ellerni. La elparolo, gramatiko, ktp. estas malfacilaj eĉ por pli kleraj homoj. Esperanto estas lingvo tiel facila, tiel vortriĉa pro la sufiksoj kaj prefiksoj, ke oni devas miri. La tuta gramatiko de la lingvo povas havi lokon sur unu malgranda paĝo kaj estas lernebla en mallonga tempo. Jam frue ni lernis ke « la volo tiras la duonon de la ŝarĝo ». Same estas en ĉi tiu rilato. Ĉar ĉiu homo timas la gramatikon, oni en Esperanto havas oportunan solvon. En sia simpleco la lingvo ankaŭ estas tre belsona.

Marista esperantisto, kiu venas al iu haveno, neniam bezonas enui aŭ ne scii, kien iri. Jam antaŭe li skribis al iu samideano en la vizitota loko kaj je la alveno li ricevas respondon. En preskaŭ ĉiu loko troviĝas esperanta klubo, kie li povas trovi amikojn. Nur unu vizito renversas ĉian dubon. En la klubo li ĉiam renkontas iun, kiu havas la saman intereson, almenaŭ por tio, kio kunigis ilin, nome Esperanto.

Ĉar Esperanto estas tiel facila kaj bona lingvo, kial la maristoj ne lernas ĝin? La kaŭzo estas, ke la maristoj aŭ ne aŭdis pri la lingvo aŭ ne scias, kie aĉeti lernolibrojn ktp. Ni, esperantistoj, ĝis nun propagandis Esperanton inter la surteraj homoj sed ne multe inter la surmaraj, kiuj eble pli bone bezonas scii Esperanton. La maristoj, se ili scius Esperanton, certe ankaŭ tre helpus al la tuta movado, ĉar ili estus vivanta reklamo por la taŭgeco de la lingvo. La maristoj ja estas internaciistoj, ĉar ili pli ofte estas en fremdaj landoj ol en sia propra.

Ankaŭ alia afero: se la maristoj scius Esperanton kaj havus okazon renkontiĝi kun esperantistoj en la lokoj, kiujn ili vizitas, ili ricevus aliajn interesojn, kaj la drinkejojn kaj aliajn malbonejojn ili evitus. La lingva muro plejparte kulpas al la malĉasta vivo en la havenurboj.

Kiel ni propagandos Esperanton inter la maristoj? Ni devas presigi propagandilojn en la nacia lingvo por disdonado inter viaj samlandaj maristoj. Ni devas viziti la maristojn en la ŝipoj kaj vendi lernolibrojn ktp. al ili.

En la havenurboj ĉiam troviĝas multaj senlaboraj maristoj, kiuj havas sufiĉe da tempo por studi kaj ankaŭ studus, sed pro la senlaboreco ili ne havas monon por pagi altan kurskotizon. Ni devas provi aranĝi senpagajn aŭ almenaŭ tre malkarajn kursojn por ili. Unue ni devas interesi la maristajn pastrojn kaj la estrojn de la maristaj legoĉambroj por Esperanto. Ili povas facile aranĝi senpagajn kursejojn. Iu samideano en la loko, kiu havas intereson por nia homama afero, eble bonvolas senpage instrui kaj ni proksimiĝas al la solvo de la plej granda malfacilaĵo, ĉar mi estas konvinkita pri tio, ke la maristoj certe interesiĝos por la lingvo, se ni nur efektive propagandas inter ili. Por la maristoj, kiuj havas laboron, ni ne povas aranĝi kursojn, ĉar ili restas tro mallongan tempon en la havenurbo.

(El la letero de R. la Vulpo, aperanta en la nuna numero de F. E. rezultas ke en Antverpeno efika solvo de la kursproblemo estas ebla sendante la maristojn al la Esperantokurso por senlaboruloj, gvidota de S-ro. Jan Jacobs. Kiu okupos sin pri tiu tasko?)

En Stokholmo la 10-an de aŭg. estis refondita la Marista Ligo Esperantista. La ligo celas disvastigi Esperanton inter la maristoj kaj ŝipkonstruistoj kaj aligi ilin al M. L. E.

Aliĝi al M. L. E. rajtas ĉiu maristo, ŝipkonstruisto aŭ alia esperantisto, kiu havas intereson por la laboro de M. L. E.

M. L. E. serĉas delegitojn en ĉiu havenurbo, kiuj volas helpi en sia loko por propagandi Esperanton inter la maristoj kaj ŝipkonstruistoj.

Ĉu vi, kara leganto, volas fariĝi delegito en via loko? Se vi ne havas tempon por mem fariĝi delegito, vi eble konas iun, kiu havas intereson por tio, sed vi mem tamen povas helpi al la propagando per aliĝo al M. L. E.

La jara kotizo estas nur 1 svisa franko.

Sendu la monon poŝtmandate al la Sekretaria Oficejo, Kvicksund.

Gesamideanoj! Sendu jam hodiaŭ vian aliĝon al  
Marista Ligo Esperantista.

Sekretaria Oficejo: Villa Skosbacka, Kvicksund, Svedujo.  
Sokr. Holger Ekblad.

---

**SUBTENO POR LA REVUO:**

Monskatolo Esp. Grupo Kortrijk: 44.— fr.



# Leteroj el Esperantujo.

I.

## AMIKO LA KOKO.

Estas agrable kaj kuraĝige, precipe por junaj kaj freŝbakitaj Esperantistoj, legi kaj aŭdi pri venkoj kaj sukcesoj atingitaj sur la verda batalejo. Tamen... ne ĉiam oni povas sukcese batali; la Esperantistaro ankaŭ spertas malvenkojn.

Kiel sufiĉe gravan malvenkon ni povas konsideri la decidon de la monda Skolt-estraro. Tiu estraro, konsistanta el sep skoltĉefuloj, decidis: «malrekomendi la lernadon de Esperanto ĉe skoltoj»!

Malrekomendi! Tio signifas por la skoltoj la saman kiel malpermesi kaj malaprobi. Pli ol du milionoj da junuloj, disvastigitaj sur la tuta mondo, sin devas reteni de Esperanto pro la obeo kaj respekto al la superuloj! Estas nekomprenibile kial ĉefuloj de mondorganizo, kies fondinto, Lordo Baden-Powell mem, rekomendis la lernadon de Esperanto, povis preni tian decidon! Ĉu per tiaj decidoj ili volas atingi la skoltan idealon: fratiĝi kun alinacianoj?

Ni esperu ke mondfamaj eminentuloj kaj aliaj influhavaj personoj sukcesos pruvi al la ĉefuloj de la mondskolto ke ili deflankegis de la rekta vojo!

Por almenaŭ iomete konsoli nin pro tiu ĉi malvenko, ni legas en «Heroldo de Esperanto» (el kiu gazeto ni ĉerpis ankaŭ la supreskribitan) ke la 2a Konferenco de Tutpacifikaj Junularaj Budais-taj Asocioj akceptis Esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj. Eh la lastaj jaroj nia lingvo pli kaj pli enpenetris en la orientajn landojn, precipe en Japanujon. La oficialaj lingvoj dum la konferencoj de la nomitaj asocioj ĝis nun estis la japana, la angla kaj la ĉina.

Same kiel dum antaŭaj vintroj, ankaŭ dum la venonta la urbestro de Antwerpen starigos diversajn kursojn por senlaboruloj. Pasintan jaron nia samideano Sro. Jan Jacobs gvidis tian Esperan kurson. Li certigis al mi ke la vizitantoj de liaj kursoj montris grandan intereseon kaj ke li spertis sufiĉan helpon de la komunuma estraro. Kvankam estus dezirinde ke tiuj komunumaj kursoj malsukcesus pro manko de senlaboruloj, ni tamen deziras al Sro. Jan Jacobs bonan sukceson kun lia nova lernantaro!

Same kiel la militintaj landoj havas sian «nekonatan soldaton», tiel Esperantujo havas sian «nekonatan Esperantiston». Car en sia dankparolado dum la ferma kunsido de la kongreso en Stockholm, generalo Bastien diris: «Sed ni ne forgesu ankaŭ alian homon, al kiu ni ŝuldas multe. Oni multe parolas pri eminentuloj. Ni pensu al tiuj multegaj Esperantistoj kiuj senlace laboras en urbetoj, en profesiaj rondoj — kies nomojn oni ne renkontas en la kongresoj, ĉar ili ne estas sufiĉe riĉaj por kongresvizito. Ni salutu la nekonatan Esperantiston!»

La 14a kongreso de la Sennacia Asocio Tutmonda (S A T) okazis en Valencio (Hispanujo) de 3-8 aŭgusto. Estis 376 partoprenantoj el 13 landoj. Dum tiu kongreso estas inaŭgurita Zamenhofstrato. Kiam la unua Zamenhofstrato aŭ — monumento en Flandrujo?

En la komenco de tiu ĉi jaro «HEROLDO» publikigis konkurson celante konstati ĝis kiu grado Esperanto kapablas servi kiel interpretisto ĉe la informado pri gravaj lokoj de fremdultrafiko en la tutmonda neesperantista gazetaro. Tri diversampleksajn tekstojn pri la angla banurbo Southend-on-Sea oni devis el Esperanto traduki nacilingve kaj aperigi ilin, aŭ unu el ili en nacilingvaj gazetoj. Tri premioj estis fiksitaj: la unua de 7, la dua de 3 kaj la tria de 2 anglaj funtoj.

Jen la rezultato: 52 gazetoj el 10 landoj publikigis la artikolojn en 13 diversaj lingvoj. La plej multajn gazetojn enhavantajn la artikolon sukcesis ensendi iu nederlandanino (18); sekvis katalun-hispano (14) kaj estono (9). Sed... ĉar la gazetoj senditaj de la nederlandanino preskaŭ ĉiuj aperas ĉe unu sama firmo-eldonejo, oni supozis ke la katalun-hispano devis fari pli grandajn klopodojn. Tial oni kunigis la unuan kaj duan premiojn kaj dividis ilin inter la nederlandanino kaj la katalun-hispano! Laŭ mia modesta opinio, tiu ĉi solvo ne estas aplaudinda, ĉar ne la klopodoj, sed la rezultoj devus esti premiitaj. Kiu scias kiom da penoj kaj klopodoj faris la tria premio por akiri la enpresigon de la artikolo en 9 gazetoj?

Saluton! ĝis la sekvonta monato!

Via servema  
R. la Vulpo.

## Antverpeno.

### LA METROPOLO DE LA FLANDRA ARTO. (FINO)

Je la fino de la 15a jc. estis aperinta brila stelo ĉe l'Flandra artfirmamento, Quinten Matsys, amiko de Erasmus, Dürer, Thomas Morus. Lia pentrarto estis ankoraŭ la pure Flandra, sen enmiksiĝo de fremdaj elementoj. La kolorefekto estas rava; la komponado drama kaj kortuŝa. Lia «Entombiĝo de la Kristo» en nia Muzeo de Belartoj ja indus specialan viziton al Antverpeno!

Inter la areo da postaj pentristoj kiuj estis pli inspiritaj de la Renesanca movado, estis eksterlande laŭvalore taksata Joos van Cleve (1490-1511) kiun François I venigis por fari sian portreton. Francisko Floris (1517-1540) alia frato de la arĥitekturisto, ankaŭ famiĝis kaj formis multajn lernantojn. La portret- kaj pejzaĝpentristoj restis pli naciaj ol la aliaj. De Francisko Pourbus, la juna, (1569-1622) la «Louvre» kaj aliaj muzeoj posedas majstrajn verkojn. Denizo Calvaert, formis skolon en Bolonjo. Georgo Hoefnagels (1545-1610) kaj Bartolomeo Spranger (1546-1627) iris Germanujon kaj iĝis la ŝatataj pentristoj de la imperiestro.

Gloria artisto originala estis ankaŭ Petro Breughel (1569), fantaziega, realista pentristo vere Flandra de la ĝojega kamparana vivo, kaj ni menciuj liajn filojn Petro II (la infera) kaj Petro III (la velura). Tro longa iĝus nia artikolo se ni devus ĉiujn preparoli. Ni ankaŭ pasas la interesajn Antverpenajn gravuristojn, kiuj pre-



ciĉe laboris por la prapresisto Kristoforo Plantin (1514?-1589) « la tipografiisto de la reĝo de Hispanujo kaj samtempe la reĝo de la tipografiistoj de sia tempo », kiu presis 50 verkojn pajare, entute 1500 ! Je lu momento li laboris per 22 presiloj kiam la plej grandaj Francaj tipografiistoj de Francujo en la 16-a, la Estienne-oj neniam havis pli ol 4 !

Estas spirita ĝuo admiru lian domegon, laborejon kaj butikon, instalitajn kiel muzeon, en kiu oni popaŝe povas sekvi la historion de la Antverpenaj artoj. En tiu domo sur la Vendreda Placo « ĉiu movo kaj bruo kvazaŭ silentiĝis por reporti la vizitanton tute en la sorĉon de la estinteco, kaj malserenigi en nenio lian intelektan revadon. »

La 17-a jarcento vidis la materian defalon de nia granda komercurbo, sed vere kurioze, tio ne povis haltigi ĝian artan genion. Kontraŭe la gloro de ĝia pentrarto apogeiĝis ! Ĉu estas vere necese konigi la « Reĝon de la Fiandra pentrarto », Petro, Paŭlo Rubens (1577-1649), la lernanton de la talentaj Van Noort (1562-1641) kaj Van Veen (1558-1629), Rubens, la gloran pentriston de tiom da satirusoj, faŭnoj, nimfoj kaj Venusoj ; la fortikan kolorbrilan pentriston, ĉe kiu ni ne plu trovas la mistikon de Quinten Matsys sed la larĝan, teatran efekton. Antoon Van Dyck (1599-1642) preskaŭ egallas sian mastron. Li estas pli poezie sentema ol li, kaj estas « la reĝo de la portretistoj » Li longe vivis ĉe la angla kortego.

Antverpeno estas vera muzeo. Krom la ĉefverkoj de Rubens kaj Van Dyck oni admiras skulptaĵojn de Erasmus Quellin (1607-78), pentraĵojn de Jordaens, ankaŭ lernanto de Van Noort kaj kelkfoje eĉ superante Rubens ; David Teniers II (1610-90) granda moropentristo.

La influo de Rubens sur la konstruanto estis grava. Laŭ la de li ŝatata « Grek-Romana » stilo li konstruis sian palacon, ankoraŭ parte konservita. La riĉe ornamita fasado de la Sta Karolo-preĝejo kun la granda altaro estas de li desegnitaj kiel ankaŭ la « Skeldopordego » ĉe la riverego.

Inter la skulptistoj kiu laboris eksterlande ni menciuj Ludoviko Willemsens (1636-1702), kiu verkis por Vilhelmo III kaj faris altaron en la Antverpena ĉefpreĝejo. H. Cosyns kaj Petro Scheermackers (1691-1781) longe vivis en Londono kaj en la abatejo de Westminster oni trovas la plej belajn verkojn de tiu lasta. En la tuta mondo troviĝas artaj laboraĵoj de Antverpenaj artistoj. Mihaelo Rysbrack (1692-1770) ankaŭ laboris por la nomita abatejo. J. B. Van Kessel en 1698 por la reĝo de Anglujo. A. Van Papenhoven (1668-1759) en la kortego de la sama reĝo. J. Millick ĉe Edwige Eleonore de Svedujo. Van Opstal (1595-1668) iĝis rektoro de la Franca Akademio de Belartoj (1659) kaj diversaj aliaj skulptistoj verkis por la francaj reĝoj.

Pro la daŭraj malfeliĉaj historiaj cirkonstancoj la arta vivo en la 18-a jc. forte malvigliĝis kaj nur poste en pli paca, moderna tempo Antverpeno povis reakiri la rimarkindan lokon pli frue okupitan.

Ĉar, ho Antverpeno

.....vi restis rava  
Kun freŝa la mien'  
Konscia pri deven'

Vi norda id' kun la triobla krono grava  
De fort' tiĉec' kaj arttrezor',  
Ne atentante pri favor'

Donaca de fremdul', el propra ter' vi fosas  
Riĉaĵojn, kaj la propran koron vi malŝlosas  
Por propra la feliĉo. Moroj, lingv', famec',  
Ankoraŭ ĉiam estas ja de Flandra ec' ! (1)

Tyneverum.

## La Krime de Anna Bede.

EN LA HUNGARA DE KALMAN MIKSZATH

Kunsidis ĉiuj juĝistoj. Ekstere la nebulo peziĝis sur la monstran konstruaĵon, kvazaŭ ĝi volus kunpremi ties murojn ; ĝi sidiĝis sur la fenestroj kaj vualigis la glaciflorojn. Sed kion volas ĉi tie la floroj ?

En la ĉambrego, kie la aero estis densa kaj peza, ŝvebis odoro de pelta jako kaj de brando, kaj en la plej supra fenestrovitro nur malrapide, inerte la ventolilo turniĝadis.

La laciĝintaj juĝistoj sidadis sur siaj seĝoj ; unu el ili kun termitaj okuloj aŭskultis kraketadon de plumo de la notario ; alia oscedante tamburetis per sia krajono sur la verda tablo, dum la prezidanto viŝadis sian frunton ŝvitantan. Liaj grizaj, malvarmaj okuloj esplorante fiksis la pordon, tra kiu jen foriras la personaro ĉe la ĵus pritraktita kriminalafero : atestantoj kaj akuzitoj.

— Ĉu ankoraŭ iu estas ekstere ? — demandas li al servisto per voĉo malrapida kaj akra.

— Knabino — respondas la servisto.

— Nu, envenu tiu knabino !

La pordo malfermiĝis kaj fraŭlino trapasis. Kune kun ŝi ŝteleniris freŝa aerfluo, kiu milde tuŝetis la vizaĝojn kaj tikladis la palpebrojn ; kvazaŭ radio estus ŝtelenirinta tra la densa nebulo kaj ĉetus dancanta inter la glacifloroj, multobligante sin sur la muroj kaj meblaro de la juĝeja ĉambrego.

(1) Ledeganck - Al Antverpeno.

LEDEGANCK, KAREL. — Eekloo 1805 — Gent 1847) El tre modesta deveno li, per energia laboro sukcesis akiri la advokata-ateston. Li iĝis pacjuĝisto kaj poste provinca lernejspektoro. Li estas konsiderata kiel unu el la plej eminentaj lirikistoj de la periodo post 1830.

Liaj poemoj : La Poligono, La Piano, Al mia Patrino, k. t. p. apartenas al la komuna literatura trezoro de nia popolo. Liaj « Tri Fratinurboj », lirika « trilogio » dediĉata al Gento. Bruĝo kaj Antverpeno estis kvazaŭ la poezia evangelio de la Flandra Movado.



Neta kreitaĵo. Gracia, laŭproportia staturu, al kiu la florornamita pelta jaketo algluiĝis, kvazaŭ ĝi estus fandita sur statuon; ŝiaj nigraj okuloj milde malleviĝis; ŝia alta, konvekso frunto estis streĉita; ĉarmo estis en ŝia apero, gracio en ŝiaj movoj, ravo en ŝia tuta estaĵo.

— Pro kia afero vi venis, knabino? — demandas la prezidanto stoike. (La ĉi tiea malafabla oficisto neniel estis impresigebla per la beleco.)

La knabino ordigas la kaptukon sur sia kapo kaj kun ĝemeto respondas:

— Grava estas mia afero, tre grava.

Ŝia voĉo estas rava kaj malgaja, kaj penetras ĝis la koroj, kiel muziko. Vizaĝo de la juĝistoj jam ne estas tiom malafabla; de ĉe la muro ĝentile signadas al ŝi la bildo de la reĝo ke ŝi rakontu tion tre gravan aferon.

Ŝi diras: «Tie estas la skribaĵo!» Sed tiun ŝi devas antaŭe serĉi sur sia brusto; ŝi devas dekroĉi la supran agrafeton de sia bluzo kaj etendi la manon por ĝi.

Ho, tiu malbela agrafeto! Jen ĝi deŝiriĝas... falas. Kia ĉarma bildo, kiam ŝi honteme kliniĝas kaj kiam la skribaĵo elfalas!

La griza, senkompata kapo de la prezidanto deturniĝas, nur lia granda, grasa mano etendiĝas al la papero.

— Verdikto, — murmuretas li kaj liaj okuloj traserĉas la skribaĵon. — La juĝistaro alvokas Anna Bede, ke ŝia duonjara arestpuno ekkomenciĝu je la hodiaŭa tago.

La knabino malgaje kapjesas. Antaŭ semajno ni ricevis la skribaĵon — flustras ŝi balbute. — Leĝjuĝista Sinjoro mem ĝin portis kaj klarigis ĝian sentencon, mia kara patrino jene diris: «Iru, mia filino, la leĝo estas leĝo, oni ne povas ŝerci pri ĝi!» Nun mi venis por suferi la punon.

La prezidanto eĉ dufoje deviŝas siajn okulvitrojn; lia malvarma vizaĝo serĉas la vizaĝojn de la kolegoj, la fenestron, la plankon kaj la grandan fornon, tra kies truita fermilo fajrerojn ŝetantaj fajrokuloj rigide lin aligardas kaj intertempe li murmuretas: «La leĝo estas leĝo!»

Denove kaj denove li finlegas la verdikton, sed vane, ĝi nur tion diras ke Anna Bede estas kondamnita je duonjara arestpuno pro ŝtelaĵaĉeto.

Nun la ventolilo ektorniĝas kun granda rapideco. Certe ventego estiĝis kaj vere, ĝi jam skuas la fenestrovitrojn kaj, kvazaŭ ĝi estus ies fantomo, siblas tra la fendoj: «La leĝo estas leĝo!»

La kruela kapo jesas aprobon al la transtera voĉo; la granda, grasa mano jam skuas la sonorileton por voki la serviston:

— Akompanu Anna Bede al la inspektoro de l'arestejo.

La servisto ekprenas la skribaĵon, la knabino nenion dirante turnas sin sed ŝiaj etaj ruĝaj lipoj kvazaŭ vortojn serĉas.

— Ĉu vi eble ankoraŭ volus ion diri?

— Nenion... nenion, nur tion ke mi Elisabeto estas, Elisabeto Bede; Anna estas mia pli maljuna fratino. Hodiaŭ antaŭ unu semajno ni enterigis ŝin.

— Do tiam ne vi estas kondamnita?

— Ho, mia kara Dio! Kial min oni kondamnas? Malbonon mi ne faris eĉ al muŝo.

— Sed kial vi do venis tien ĉi, vi, malsaĝulino?

— Nu, tial, mi petas, ĉar «dum tiu ĉi afero de Anna» estis ĉe la reĝa supera tribunalo, ŝi mortis. Kiam ŝi estis kuŝigita sur la katafalko, alvenis tiu ĉi dekreto «pri la duonjaro», kiun ŝi tamen ĉevas punsuferi. Ho, kiom ŝi atendis! Tamen ne ĉi tion ŝi antaŭvidis.

Larmoj ekfalas je la rememoro; apenaŭ ŝi kapablis daŭrigi:

— Dum ŝi kuŝis tie, senmove, la okuloj fermitaj, poreterne mutiĝinte, kune kun mia patrino ni promesis al ŝi ĉion rebonigi, kion ŝi pekis kontraŭ la leĝo pro sia amanto. (Ĉar ŝi tre amis tiun Gabrielon; pro li ŝi enmiksiĝis en la pekon). Ni tiel pensis, por ke...

— Kial, mia filino?

— Por ke ŝi havu plenan ripozon en la morto. Neniu povu diri ke ŝi restis ies ŝuldantino: mia patrino repagos la malprofiton kaj mi ja punsuferos la duonjaron.

La juĝistoj ridetante rigardas unu la alian. Kiom naiva, kiom malsperta estas tiu ĉi knabino! Ankaŭ la vizaĝo de la prezidanto kvazaŭ jam ne estas tiom ceremonie malvarma. Per sia naztuko li nun ja ne viŝas sian frunton, sed ion pli malsupre...

— Estas bone, mia filino — diris li mallaŭte kaj milde — sed atendu nur, mi ĵus nun ekmemoras...

Sian grandan manplaton li metas sur sian frunton kaj faras kvazaŭ li enprofundigus en pensoj.

— Jes, jes, granda eraro estas en la afero. Eraran skribaĵon ni sendis al vi.

Siajn grandajn okulojn vigle levas la knabino kaj rapide ŝi interparolas:

— Vi vidu, vi vidu!

Tia malgaja riproĉo estis en ŝia voĉo, ke la maljuna prezidanto denove elprenas la naztukon. La kruela homo, tute kortuŝita, iras al la knabino, karesas ŝiajn harojn subtile:

— Supre, ĉe la supera tribunalo alia justeco fariĝis. Iru hejmen, mia filino, mi sendas miajn salutojn al via kara patrino, diru al ŝi, ke via fratino Anna estis senkulpa.

— Pensis ni tion! — flustris Elisabeto Bede kaj ŝiaj malgrandaj manoj premis al si la koron.

Trad. Kolomano J. Nagy (Debrecen).

(\*) KALMAN MIKSZATH. — Majstra hungara novel — kaj romanverkisto, (1848-1910) kiu plej volonte pritraktas la naskiĝlandon, la popolon, la familion kaj la infanoj. Li precipe ŝatas tiujn strangajn, maniajn figurojn, pri kiuj la antikva hungara vivo abundas. Liaj verkoj karakterizas sin per bongusta hungara humoro kaj mirinda rakontadmaniero. Ili estas multe legataj, ankaŭ en la eksterlando ĉar apenaŭ estas kulturlingvo en kiu ne ekzistas tradukaĵoj de Mikszath. (N. d. l. Red.)



**Alta Turo.**

(Hooge Toren).

E. De Weert

Alta tur', fiera ŝton,  
reĝa estas via kron' ;  
kanton reaŭdigu vi  
varme kaj  
ĉarme kaj  
kun pasi' ;  
kiu vokas en memor'  
tempon de la Flandra glori'.

J. Broeckx

Alta tur', fidela vi,  
bronza via vekokri'  
reavertu pri l' danĝer',  
skue nun,  
brue nun,  
sur la ter' ;  
kiel ĉiam via ton'  
estis je l' popoldispon'.

Alta tur', gracia pik',  
sonu ree ĝojmuzik',  
sonu la sonorilar  
hele plej  
bele plej  
el la jar',  
akompane al la kant' :  
« Vivas ree Flandroland' ! »

Juul Karnas.

**Bibliografio.**

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas. Ĉiu verko estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto.)

W. SIEROSZEWSKI. Marŝalo JOZEF PILSUDSKI. Kun permeso de la aŭtoro tradukis kaj komentariis Mgr. Fil. B. Strelczyk. Eldonis Pola Esperanto Asocio, Warszawa. 53 paĝoj.

Historia biografio pri la Marŝalo ; libro kiu alportas al la eksterlando nekonatajn detalojn kaj enlande atestos en patriotaj rondoj pri la propaganda valoro de Esperanto por naciemaj celoj.

« DE BERG THABOR. » — KALENDARO. Prezo : 3 fr. — Pensu pri la infanoj, minacataj de tuberkulozo, aĉetu la kalendaron, kiam hejme oni ĝin prezentos.

**Gratulojn.**

Al Gesinjoroj J. Van Geel-De Smet, membroj de Flandrema Grupo Esperantista, kiu edziĝis la 11-an de septembro.

Al Gesinjoroj J. Timmermans-Geeraerts, membroj de Flandrema Grupo Esperantista, kiu edziĝis la 13-an de oktobro.

**Vi preterpasis min....**

Horojn mi jam atendadis  
Vian venon, ho, knabin',  
Horojn, tiel malrapidajn,  
Dum mi deziregis vin.

Horojn, dum mi vin parolus  
Pri la kriz' de mia kor' ;  
Tamen per la amkonsolo  
Tuj forirus la dolor'.

Daŭre sonis en spirito  
Vortoj, kiujn flustros mi,  
Kiam pro admir' mi tremos  
Antaŭ via ammagi'.

Horojn, dum mi atendadis  
Vian venon, ho, knabin'...  
Fine, kiam vi aperis...  
Ve ! vi preterpasis min.

Pol Varens.

**Diversaj sciigoj.****RADIO**

La Esperantista Grupo el Kortrijk akiris la permeson por disaŭdigo de Esperanto-kurso pere de la regiona stacio Radio Kortrijk, ondlongeco 204 metrojn.

La kurso okazas dimanĉe, de la 8 $\frac{1}{2}$ -a ĝis la 9-a ; ĝin gvidas S-ano Debrouwere.

Tiuj dissendoj certe helpas al plia disvastigo de nia movado en Okcidenta Flandrujo, kie jam estas granda nombro da samideanoj.

**KOREKTAJ NEDERLANDLINGVAJ TEKSTOJ EN LA KINEMATOGRAFINDUSTRIO**

La « Vereeniging voor Beschaafde Omgangstaal » (Unuiĝo por civilizita konversacia lingvo) efike daŭrigas sian agadon por korektaj filmotekstoj. Protesto, subskribita de la Prezidantoj kaj Sekretarioj de 36 flandraj kulturaj kaj ekonomiaj unuiĝoj, inter kiuj Flandra Ligo Esperantista, estas transdonita al 35 Bruselaj filmagentoj. El iliaj respondoj evidentiĝas klare ke ili laŭvalore komprenas la neceson de taŭgaj nederlandlingvaj filmotekstoj. Ĉiuj tamen ili opinias ke iliaj tekstoj estas seneraraj, ke do la protesto ne alcelas ilin, sed... la konkurencajn filmagentejojn. Ili tamen ĉiuj deziras ke oni montru al ili eventualajn erarojn, por plifacile eviti ilin en la estonto.

Tasko nun estas serĉi kaj serĉadi la nekorektajn tekstojn kaj montri ilin al la koncernaj filmagentejoj. La momento estas treege favora. La 36 kunlaborantaj unuiĝoj, la radiosendstacioj kaj la gazetaro senreserve apogas tiun agadon. Certaj filmentreprenoj mem trovas ke la situacio kiu regas en ilia industrio ne plu estas tolerebla kaj la nunan sezonon ili projektos antaŭ siaj filmoj tekston per kiu ili konsentas pri la agado de la Unuiĝo por Civilizita Konversacia Lingvo.



Niaj gelezantoj — filmanantoj nepre armigu sin per krajono kaj noticlibro por fanatike kontraŭbatali la erarajn titolojn kaj surskribojn. La sekretario de la U. C. K. L., Deurnestr. 97, Oude-God, Antw. atendas de vi aron da leteroj kun preciza aldono de la **craroj kaj ties rilato en la teksto, la koncerna filmo kaj la agentejo**; ankaŭ, se eble, kun propono kiamaniere korekti la eraron. Protesto tiam tuj estas sendata al la « kulpa » agentejo kaj eventuale al la eksterlandaj filmoproduktantoj.

\*

#### INTERNACIA JURNALO ENKONDUKAS ESPERANTON

La semajna ĵurnalo « EUROPEAN HERALD » eldonata en Londono kaj ĝis nun redaktata en la angla, germana, franca, hispana kaj itala lingvoj, decidis aldoni Esperanton al la lingvaro uzata. La Esperanta sekcio naskiĝos kun la numero de 28 septembro, kaj redaktos ĝin S-ro Fred Wadham, L. K., Brita Ĉefdelegito de U.E.A.

La enhavo de la ĵurnalo estas interesa por ĉiu Esperantisto, kaj lingvistudentoj trovos ĝin tre utila. La Esperantan sekcion oni daŭrigos nur, se montrigos intereso flanko de la samideanoj. Okaze de forta subteno, oni pligrandigos la Esperantan parton.

« European Herald » estas vendata de gazetvendistoj en preskaŭ ĉiuj landoj. Tiuj, kiuj ne sukcesas ĝin aĉeti, sendu respondkuponon (poŝtan de U. E. A.) al « European Herald », 110 Fleet Street, London, E. C. 4. Prezo en Belglando Fr. 1.50

#### KORESPONDO

Lazaro A. Abradoviĉ, Tub. Instituto, Jalta, Krimeo U. R. R. S deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun la markoj bildflanke; intersanĝas gazetojn, fotojn, esperantaĵojn.

## Inter ni.

**AALST.** — **PIONIRO.** — Dum la somera periodo, niaj fidelaj anoj daŭre venis ĉiumerkrede al nia ejo por tie esperante babili, kartludi kaj diskuti.

Nun denove la vintro sin anoncas kaj ni aranĝis kurson por komencantoj, kiu okazos en la lernejo Nieuwebeekstraat ek de dimanĉo, la 4-an de novembro, dum en nia ejo S-ro. Neirinckx gvidos kurson perfektigan ĉiumerkrede, akurate je la 19  $\frac{1}{2}$ -a. Nia prezidanto gvidas kurson en Lede, ĉiujauĉe je la 19  $\frac{1}{2}$ -a. Aliflanke, nia ano laborema, S-ro R. De Kegel organizis ĉe-kurson en Haal-tert.

Ĉiumerkrede, post la leciono, okazos denove regula kunveno en nia ejo.

Kiel niaj samideanoj legis en la ĵurnaloj, la morto forrabis fraton al nia samideanino F-ino. Thesin. (Li pereis pro eksplodo de sia flugmaŝino apud Perk.) La enterigo estis ĉeestata de pluraj centoj da simpatiantoj. Li ankaŭ sin interesis pri Esperanto. Al la funebranta familio la flandra Esperantistaro esprimas sian sinceran kondolencon.

**AARSCHOT.** — **LA PROGRESO.** — Du vintraj kursoj komenciĝis la 5-an de oktobro; la unua por komencantoj, la dua por sinperfektigantoj. Ambaŭ estas gvidataj de nia senlaca batalanto S-ro. Jef Van Winckel. Ili okazas kun la kunhelpo de V. T. B. en ties ejo: Granda Placo.

La grupa vivo ankaŭ ree plivigliĝis; la kunvenoj regule okazas post la kursoj. Ni priparolas la propagandon kaj ni ripetas la kantojn lernitajn dum la pasinta sezono. Nur malmultaj gemembroj neĉeestas kaj ni esperas ke baldaŭ ili retrovos la vojon al « la progreso »!

**ANTVERPENO.** — **FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.** — Pasintan monaton nia grupo faris viglan propagandon, pere de diversaj flandraj gazetoj, por nia kara « Lingvo Internacia ». Eĥ nia ejo, nun lokita en movadoriĉa trafikcentro, ni pendigis grandajn Esperanto-afiŝojn, kiuj altiras la atenton de ĉiu preteriranto. Esperu ni ke tiu ĉi propagando alportos multajn novajn membrojn al la grupo!

Jam de nun nia estraro vigle laboras por ke nia Kristnaskofesto estu ankoraŭ pli brilega ol antaŭajn jarojn. La programo estos denove tre prizorgata.

**ANTWERPEN.** — **LA REKTA VOJO.** — Diversaj interesaj kunvenoj sin sekvis kaj ili estis ĉeestataj de multaj gemembroj.

Ni aŭdis Sron. Torremans pri Hungarujo; Sron. Van den Eynde pri nia movado en Leuven kaj Aarschot; Sron. Van der Mast pri lia vojaĝo en norda Francujo (krom vizito al « ĉarmulinejo »).

Ni ankaŭ kantis: « Alta Turo », la lasta kreitaĵo de nia prezidanto.

Dum la venontaj kunsidoj ni ree antaŭvidas agrablajn programojn kaj sekve do ankaŭ grandnombran ĉeeston.

**BRUSSEL.** — **N. E. L. E.** — La 16-an de Okt., nia amiko H. Rainson, paroladis en nia ejo pri Esperanto. La efika propagando en la lokaj ĵurnaloj certe estas la kaŭzo ke tiu parolado plene sukcesis. Sekve de tio, la 23-an de okt., komenciĝis en nia ejo Esperantokurso gvidata de nia juna ano R. Loeckx.

Niaj semajnaj kunvenoj estas denove tre kontentige ĉeestataj. Ni bone konscias ke la okuloj de la tuta Flandra Esperantistaro estas kritike direktataj al ni ĉar, la honoran taskon: prepari la 6-an kongreson, ni inde devas plenumi. Neniu neglektu do la ĉeeston de niaj semajnaj kunvenoj kaj ĉiu kunhelpu entuziasme.

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis la ĉiujaran subidon de la provincestraro. (Gratulojn! — N. d. l. R.)

**HOBOKEN.** — **HOBOKENA GRUPO ESPERANTISTA.** — En la kutima, gaja atmosfero nia grupo havis sian ĉiujaran festeton sabaton, la 20-an de oktobro, okaze de la diplomdisdono al la lernan-



toj de la pasintjara kurso. Dum tiu kunesto, nia prezidanto, S-ro. Van Tichel, kiu certe havis la plej grandan meriton en la sukceso de la vespero, lerte trovis la okazon propagandi la novajn kursojn.

**KORTRIJK.** — **ESPERANTISTA GRUPO.** — Merkrede, la 3-10, la Grupo havis la plezuron ĝui pri la interesplena parolado, ilustrita per multaj lumbildoj de Gust Vermeulen, kiu iris bicikle al Oberammergau kaj trapasis diversaj landojn, nome : Nederlando, Germanujo, Aŭstrio, Lichtenstejno, Svisujo, Francio kaj Saarteritorio.

Tiun paroladon ĉeestis 40 gesamideanoj ; la prezidanto esprimis la deziron vidi ĉiusemajne tiom da membroj dum la klubvesperoj... La 8-an de novembro, je la 7½-a vespere okazos la unua leciono de la nova vintra kurso. Por tio la urbestro metis je dispono de la grupo ĉambregon de la urboĉefo.

Lastan alvokon ni faras por ke ĉiu membro alkonduku almenaŭ kelkajn lernantojn.

Same kiel pasintjare, la kurso okazos parte per lumbildoj bonhumoraj.

**MECHELEN.** — **LA ESTONTO.** — Ni do organizis du kursojn : simplan, donatan de F-ino. Van de Werf, Martine kaj perfektigan, gvidatan de nia loka prezidanto S-ro H. Rainson. La nombro de lernantoj estas tamen malpli granda ol pasintan jaron.

Niaj vintraj kunsidoj denove estas tre interesaj kaj ni ne sufiĉe povas instigi al regula ĉeestado, akurate je la 20-a. horo.

Kiel jam la pasintan jaron, la loka grupo de V. T. B. disdonis belajn esperantajn premiojn al la lernantoj de la antaŭa kurso. Estas vere ĝojige konstati la kunlaboron de la Turista Ligo tra tuta Flandrujo.

**ROESLAERE.** — **RUSELARA GRUPO ESPERANTISTA.** — Nia grupo perdis sian prezidanton, S-ron. Honoré Braeckeveldt, sed feliĉe tiu perdo nur daŭros ok monatojn, la tempon por fari soldatservon en Oostende. S-ro. Ach. Willaert estras la grupon dum tiu periodo kaj li estos helpata de S-roj. Henri Braeckeveldt kaj Marcel Vermeulen.

Nia nova kurso komenciĝis la 24-an de septembro. S-ro Henri Braeckeveldt gvidas por dudeko da regulaj gelernantoj. Ĉar tamen la kurso okazas ĉiulunde, la grupkunvenoj nun estas vendrede. Tiu ŝanĝo nun iomete malutilas la ĉeeston, sed post la kursoperiodo ni ree kunvenos lunde kaj tiam pli multnombre ol iam pro la ĉeesto de la intertempe « novbakitoj ».

**RONSE.** — **LA PACA STELO.** — La grupo pli intense laboras precipe per la 2 novaj kursoj gvidataj de F-ino Vandercoilden kaj S-ro. Geenens.

Jen la programo por la monato novembro : la 7-an : Ĝenerala kantvespero ; la 14-an : Daŭrigo de la tradukado komuna de « La filosofo de Haagem » ; la 21an : distraja vespero.

Ni rememoras ĉi-tie ke la grupo vendas fotografajojn jubileajn. Kiu grupo ne dezirus posedi tian ĉiaman rememoraĵon ? Nia grupo ĉiam estas helpema al aliaj kaj tial ni dezirus ke pliaj grupoj ankaŭ kunhelpus nin per aĉeto de UNU foto. Ili estas mendeblaj en la sidejo de la grupo mem : « La Paca Stelo », **Concordia**, en Ronse. Kiu nun donos la bonan ekzemplon ?